



En **Adam-Mickiewicz-Universitato (AMU)**, en **Poznano, Pollando** jam de 1998 funkcias la **internaciaj postdiplomaj interlingvistikaj studoj**.

En la studjaro 2022/23 startis la unuan fojon la **2-jaraj magistraj studoj pri interlingvistiko** por internacia studentaro enkadre de la fako **Lingvistiko kaj Informmastrumado** (en la Fakultato pri Modernaj Lingvoj kaj Literaturoj).

### Ĉu vi volas:

- altnivele (C2) scii esperanton kaj la anglan?
- akiri sperton en tradukado inter la du lingvoj?
- superi la problemojn en interkultura komunikado?
- studi internacian lingvopolitikon?
- analizi la esperantan gramatikon kun ĝiaj specifaĵoj en komparo kun aliaj lingvoj?
- koni esperantajn literaturon, kulturon kaj movadon en monda kunteksto?
- konatiĝi kun konstruitaj lingvoj el la pasinteco kaj nuntempo?
- spertiĝi en la uzo de komputiloj por lingvaj taskoj (fontoj, vortaroj, retejoj, tradukprogramoj ktp.)?
- studi en internacia grupo?
- ekkoni la ĉiutagan vivon en Pollando?



### Tiam elektu

la **magistrajn studojn pri interlingvistiko de AMU**, en la alloga universitata urbo **Poznano** (duonvoje inter Berlino kaj Varsovio)!

La surlokaj 2-jaraj studoj valoras **120 kredit-poentojn** kaj donas magistran (master) titolon. La lingvistikaj studobjektoj estas en **esperanto**, tiuj pri informmastrumado en la **angla**. Anglalingvanoj povos studi alian lingvon anstataŭ la angla.

**Informoj:** [interlin@amu.edu.pl](mailto:interlin@amu.edu.pl) kaj <https://kml.amu.edu.pl/en/interlinguistics/>  
**Aliĝo** ekde la 1a de junio 2023:  
<https://rekrutacja.amu.edu.pl/en/studies-cataloge/linguistics-and-information-management-specialty-interlinguistics,562>

Konsultu la **lernolibrojn de la Studoj:**  
**Interlingvistiko** kaj **Esperanta kulturo:**  
<http://interl.home.amu.edu.pl/interlingvistiko/eldonajoj.html>